

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 8

Aŭgusto, 2016

Karaj legantoj, jen estas postkongresa numero de nia bulteno, kie vi trovas raportan artikolon de nia prezidanto d-ro L. Kordylewski. Alia raporto devas aperi en septembra numero de "Saluton!" Ĉi sabate je tagmezo en Hyde Park (Giordano's Pizza, 5311 S. Blackstone Ave.) sub la gvido de Hanso Becklin okazas renkonto de komencantoj enkadre de nordamerika evento Paralela Universo.

Bedaŭrinde, vi legos ne nur pri gajnoj de la tutmonda E-movado, sed ankaŭ pri perdo.

–La Redaktoro

Sukcesa UK-101 en Nitro

Ĉi jare la mezgranda slovaka urbo Nitra fariĝis la ĉefurbo de Esperantujo, al kiu alvenis preskaŭ 1200 samideanoj de dekoj da landoj. Dum la ekskursoj nur la profesiaj slovakaĝ gvidantoj bezonis esperantajn interpretistojn, ne ni, la plurlingvaj grupoj de esperantistoj. Dum unu semajno la Kongreso estis modelo de tio, kiel la nuntempa mondo povus funkcii – sen la lingva problemo. Sed paradokse, la nuntempaj teranoj tamen preferas malsaĝan lingvan kaoson, ne la bonajn, elpruvitajn ideojn, kiel tiu de unu neŭtrala lingvo por ĉiuj. Dum la Nitra Kongreso nia lingvo ankoraŭfoje pruvis ĝian facilan lerneblecon: la slovakaĝ servistinoj en la kongresa manĝejo jam post kelkaj tagoj sufiĉe bone majstris bazan Esperanton! En neniu alia fremda lingvo ja tio eblas.

La kongresanoj malkovris por si la multjarcentan historion de la originoj de Slava Kristanismo en la Centra Eŭropo, kies lulilo estis Nitra. Abundas tie antikvaj preĝejoj kaj sanktejoj. Bele intermontete situita urbo estis ideala por la Universala Kongreso. Dum la kongresa semajno ni estis videblaj. Multaj komunaj aranĝoj okazis publike en la stratoj. La nacia kaj internacia spektakloj sur la ĉefplaco allogis amason da lokaj nitranoj. Ili aplaŭdis ankaŭ al la verdaj marŝantoj kun vigla muziko kaj flagoj dum la impona parado tra la ĉefstratoj (vd la foton). Lokaj entreprenoj, kiel ekzemple la miel-vin-keloj "Tomka", mem metis flagojn kaj e-afiŝojn sur siajn pordojn. Sur la frunto de la



grandega Urba Teatro pendis giganta, certe la plej granda Esperanto afiŝo, kiun mi iam ajn vidis. En la urbocentro la stratoj estis esperante ornamitaj kaj abundis multkoloraj afiŝoj pri la kongreso. La urbestro regalis la kongresanojn per la impona akcepto en la urbodomo. La kongresanoj ĝuis senpagajn rajdojn en la urbaj aŭtobusoj.

La programo estis abunda kaj riĉa. Dumtage samtempe okazadis po kelkaj eventoj en diversaj salonoj. Ne eblis partopreni en ĉiuj. Eĉ

teatraj prezentadoj en la Urba Teatro okazadis samtempe en diversaj salonoj. Furoris mia malnova amiko Jerzy Handzlik, kiu denove ludis D-ron Zamenhof, ĉi-foje en la bele renovigita urba sinagogo.

Dum la kongreso la junulara branĉo de UEA fariĝis jure sendependa. Por ne emfazi iun skizmon, oni strebis integri du ĉefajn

grupojn de la kongresanoj: junulojn kun olduloj. Multaj aktivaĵoj estis planitaj por ambaŭ. Sed ekzemple dum la vespera pikniko nur la junuloj sidis sur la herbejo, dum la olduloj preferis sidi sur la najbara ŝtuparo. La divido okazis neplanite, sed estis neevitebla.

La ĉefa kongresa temo pri la justeco de lingvoj bone korespondis kun la loka lingva situacio. En la relative novbakita ŝtato de Slovakio tamen estas uzataj diversaj lingvoj: slovaka, ĉeĥa, hungara, kvankam nur la slovaka estas la oficjala.

Ĝis la revido venontjare en Seulo, kaj en Lisbono en 2018!

–L. Kordylewski

EU-komisionano Faris Paroladon en Esperanto

Lige kun la Universala Kongreso en Nitro en loka universitato okazis altnivela kongreso pri perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio. La konferenco, kiun ĉeestis 120 personoj, inter ili lingvistoj, politikistoj, diplomatoj kaj reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj kaj kiu okazis en la slovaka, la angla kaj en Esperanto, honoris per sia ĉeesto Vytenis Andriukaitis, litova ano de la eŭropa komisiono, kiu faris sian paroladon en Esperanto. En sia parolado, farita en bona Esperanto, Andriukaitis interalie rakontis pri sia propra sinteno al la lingvo:

– Por mi persone Esperanto havas klaran ligan kun la lukto kontraŭ devigo. En la sovetia tempo la uzo de Esperanto estis protesto kontraŭ la reganta rusa lingvo, kiun oni devigis al ni uzi. En la disidenta movado mi proponis paroli Esperanton anstataŭe – kiel simbolo de humanismo kaj demokratio.

Laŭ li, Esperanto povus havi rolon ankaŭ ene de Eŭropa Unio, kaj ĝi havas gravan avantaĝon kompare kun la angla:

– La angla estas tre utila kaj disvastigita en la hodiaŭa mondo, sed ĝi neniam povas doni tiun egalecon en komunikado kiun donas Esperanto – kie ĉiuj akceptas lerni facilan, neŭtralan lingvon, kaj tiel evitas la imperiismon de unu nacia lingvo, kiu donas dumvivajn, nemeritajn privilegiojn al denaskuloj, kaj maljuste metas la plimulton de la homaro en konstantan malavantaĝon.

Dum la konferenco en Nitro okazis pluraj podiaj diskutoj kaj prelegoj de spertuloj pri diversaj kampoj de lingva politiko, interalie pri lingvolernado en EU, pri la influo de lingvaj problemoj al la civitana partopreno en EU ktp. *–Libera Folio*

Alvoko por Komuna Informkampanjo pri Esperanto

La pasintmonataj okazaĵoj montris, ke la nuna tempo tre taŭgas por informi pri Esperanto, ĉar homoj multe pli ol antaŭe interesiĝas pri lingvaj demandoj, ĉefe en la landoj de Eŭropa Unio, sed ne nur. La skizo de la plano de UEA kaj TEJO estas helpi la informadan agadon pri Esperanto kunordigante kaj proponante rimedojn bezonatajn por tion efike fari. Por la kunordigado ni serĉas ĉefkunordiganton, kunordiganton de tradukantoj, kiel eble multajn tradukantojn, grafikumantojn, disvastigantojn, homojn, kiuj ŝatus kunlabori por tiu celo.

Skribu al briteliro@co.uea.org (laŭeble ĝis la fino de Aŭgusto 2016) indikante pri kia supra rolo vi interesiĝas, kaj vi estos invitata al laborgrupo por kunlabori por laŭeble plej taŭga utiligo de la situacio por plibonigi la konatecon kaj prestiĝon de Esperanto. Ni planas, ke la kunordigado okazos ĉefe interrete. *–UEA*

Paul Gubbins (1949–2016)

Subite, en dormo la 7an de Aŭgusto, en la aĝo de 66 jaroj forpasis d-ro Paul Gubbins. Li naskiĝis la 9an de Novembro 9, 1949 en Southport (Anglio), studis lingvojn en la Universitato de Manĉestro kaj tiam en Kanado, kie li ricevis doktorecon en germana literaturo. Li instruis germanan en lernejo, laboris kiel ĵurnalisto, kaj poste - universitata profesoro de ĵurnalismo, sperta en aplikoj por cifereca teknologio. Li konatiĝis kun Esperanton kiel plenaĝulo, sed Verda Stelo akompanis lin al la lastaj surteraj tagoj.

Prezidanto de Esperanta Asocio de Britio, membro de la Akademio de Esperanto (ekde 2007), redaktoro de la revuo “Monato”, E-dramverkisto, aŭtoro de kelkaj libroj en la angla.

Ni konatiĝis en la 1997 aŭ 1998 jaro dum unu el E-Kongresoj en Skotlando, sed pli proksimiĝis en 2001, dum UK en Zagrebo (Kroatio), kiam Paul gajnis unuan premion en BK per rakonto “Gamp”. Mi gratulis s-non Paul okaze de la sukceso kaj proponis veton, ke mia ukraina traduko de lia rakonto aperos pli frue ol original en revuo Fonto, kiu havis ekskluzivan rajton je publikado de premiitaj verkoj. Mi tiam gajnis keston da biero, kiun ni fintrinkis en E-rondeto en Anglio...

Forpasis ankoraŭ unu Esperanta Donkiĥoto, ripozu en paco, estimata Samideano.

–Araneo



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ


1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!
Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

23an de Aŭgusto – La 101-a UK en Nitro (Parto 1)

27an de Septembro – La 101-a UK en Nitro (Parto 2)

TIME

Bona artikolo priesperanta aperis en la usona revuo “Time”:
<http://time.com/4417809/esperanto-history-invention>



Somerolimpikoj Aŭgusto 5-21 en Rio